

La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

6 OKTOBRO 1978
66-A JARKOLEKTO

ISSN 0014-0694
FONDITA EN 1913

Kurso pri kursoj

Kiel ni jam anoncis en la antaŭa numero de *La Espero*, okazos kurso en Jönköping la 17an, 18an kaj 19an de novembro, kiu direktas sin al ĉiuj, kiujn koncernas kursoj.

Dum tiuj tri tagoj oni lernos kiel instrui en komencantaj kursoj, kiel oni preparas lecionojn, kiel prezenti la plej kutimajn gramatikajn problemojn, sed ankaŭ kion fari por ke la kursanoj sentu sin hejme en la kurso kaj entuziasmiĝu pri esperanto.

Oni bezonas koni iom da esperanto por povi partopreni kaj ricevi utilon de la kurso.

La kosto, kiu inkluzivas partoprenkotizon, loĝadon kaj manĝadon, estas de 200,— kronoj en duopa ĉambro kaj 240,— kronoj en unuopa ĉambro. 10 kronoj aldoniĝas al tio, se vi bezonas luitukojn. Se vi estas el Jönköping kaj loĝos hejme, vi bezonas pagi nur 110,— kronojn.

La kurso okazos en Södra Vätterbygdens folkhögskola.

Se vi havas demandojn, kontakti Jack Snarberg, tel. 036-11 37 99, aŭ Karl Buremo, tel. 036-17 44 66. Al Karl Buremo, Vallmostigen 29, 552 46 Jönköping, vi sendas vian aliĝilon **plej laste la 31an de oktobro!**

Donu en via aliĝilo la jenajn informojn:

Nomo, adreso, poŝtnumero kaj loko.

Telefona numero.

Ĉu vi venos per aŭtomobilo aŭ ĉu vi bezonos esti atendata ĉe la stacidomo?

Ĉu vi venos vendrede aŭ nur sabate?

La klubo de Jönköping kaj SEF atendas viajn aliĝojn!

— UNIVERSALA KONGRESO —

Vasta virina programo dum la kongreso en Varno

Dum la Universala Kongreso en Varno okazis speciala serio da programoj por virinoj. Pri ili Märtha Andréasson sendis la jenan raporton:

La Komisiono por virina agado de UEA havis sufiĉe ampleksan programon dum la kongreso en Varna. Estis sep diversaj programpunktoj kun varia enhavo: laborkunsidoj (unu el ili speciala diskutkunveno kun gruplaboroj), prelegoj, vizito en uzino, podia diskuto kaj lunĉo kune kun la prezidantino kaj aliaj virinoj de la Ŝtata Komitato de Bulgaraj Virinoj.

En la gruplaboroj oni povis elekti inter diversaj temoj. Mi partoprenis en grupo, kiu diskutis la estontecon de la virina komisiono mem. Ni konstatis, ke virina sekcio estas dezirinda pro pluraj kaŭzoj kaj decidis rekomendi al la landaj sekcioj starigi virinan sekcion, kiu i a pli facile povus kontakti enlandajn virinajn organizojn. Eble tio estos rimedo por havigi ankaŭ pli da virinaj membroj al UEA, ĉar nun ili reprezentas nur 25% de la



membraro. Kiel helpo en la agado la komisiono povus eldoni specialan virinan bultenon, kie oni povus prezenti sian laboron, sed ankaŭ aliajn demandojn, kiuj tuŝas speciale la virinojn. Eble oni povus en tia maniero instigi ilin pli aktiviĝi. Do, la grupo unuanime rekomendis daŭrigi la laboron de la komisiono.

Alia grupo diskutis la pozicion por la virino en la esperantomovado kaj la kaŭzojn, kial ne multaj virinoj estas en gvidaj pozicioj. Oni konstatis, ke ne ekzistas videblaj barieroj kaj ke ofte dependas de la virinoj mem. Ili ne volas havi aŭ timas la laboron. La grupo opiniis, ke ne ekzistas obstakloj por la virinoj labori laŭ la nuna organizo kaj estis hezitema, ĉu necesas speciala virina sekcio.

Unu grupo diskutis pri infanlibroj, aŭ pli ĝuste pri la manko de infanlibroj, kaj la eblecoj provi nuligi la mankojn.

En la kadro de la komisiona laboro Julie Tonkin faris unuhoran prelegon pri «Vojaĝan-

taj virinoj de la 19-a jarcento» kaj Ada Fighiera-Sikorska pri sia laboro ĝenerale kaj pri la problemoj, kiujn ŝi renkontas en sia laboro en vere vira medio kiel redaktoro de *Heroldo de Esperanto*.

Okazis ankaŭ podia diskuto pri la verkanta virino sub gvidado de Victor Sadler.

Ĝenerale oni povas diri, ke tio estis ambicia kaj interesa programo; sed mi konstatis, ke ĝi plurfoje koliziis kun la ĉefaj kongresaj punktoj, ekzemple komitatataj kunsidoj, debatoj kaj diskutgrupoj pri la kongresa temo. Estonte estus preferinde, ke tiuj, se eble, ne konkurencu unu kun la alia.

Fine mi volas aldoni, ke la virina grupo provis organizi infanvartejon dum la kongreso. Kelkaj protestis, ĉar oni opiniis, ke la virinoj tiam estas tuj en sia «patrino-infano-rola», sed oni respondis, ke ĉar la viroj ne pripensis la infanojn antaŭe, iu devas fari, ĉar tio estas grava kaj necesa.

Märtha Andréasson

La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet
Adress: Box 4009,
122 04 Stockholm-Enskede
Ansvarig utgivare:
Bertil Åkerberg
Redaktör: Franko Luin,
Myggdalsvägen 123,
135 42 Tyresö
Telefon hem: 08 - 712 82 91
I redaktionen: Sven
Alexandersson, Åke
Blomberg, Anita Lindblom,
Geoffrey Sutton
Prenumeration: 40 kronor
per år, postgiro 20 12 - 3,
Esperantoförbundet
Tidningen utkommer med
8 nummer per år: i februari,
mars, april, maj, september,
oktober, november och
december
Manusstopp: den 10, måna-
den före utgivningsmånaden
Fotosats: Esperantoförbundet
Tryck: Sturetryckeriet AB,
Stockholm 1978

Esperantoförbundet

Postadress: Box 4009,
122 04 Stockholm-Enskede
Besöksadress: Hägerav. 31,
(T-station Tallkrogen)
Telefon: 08 - 48 99 76
Förbundets expedition har
öppet tisdagar kl. 18 — 20
Postgiro: 20 12 - 3
Medlemsavgift: direkt-
ansluten medlem 50 kronor,
ungdomsmedlem under 26 år
25 kronor, familjemedlem
utan tidning 15 kronor
Prenumerationsavgift för *La
Espero* och *Esperanton* nytt
ingår i medlemsavgiften.
Medlemmar under 30 år får
dessutom ungdomsförbundet
SEJUs blad *ktp*.

Esperantoförlaget

Postadress: Fack,
200 42 Malmö
Besöksadress:
Möllevångsgatan 20 B
Öppetider: 1 sept — 15 maj:
onsdagar kl. 10 — 11,
torsdagar kl. 17 — 18
Skriftliga beställningar
expedieras hela året, även
under sommaren
Telefon: 040 - 12 20 29
Postgiro: 578 - 5
Expedition:
Anna-Greta Strömne
Medhjälpare: Wivi Nilsson
Styrelsens ordförande:
Åke Blomberg


JES & NE

Några frågor om resan till Luzern

Den bilaga som följer med detta nummer av *La Espero* är något nytt, därför kräver den en liten förklaring.

Även nästa år tänker SEF anordna en resa till världskongressen. Problemet är, som alltid, att vi inte vet vad som kan tänkas vara den mest attraktiva lösningen. Ligger Schweiz så pass nära, att det inte lönar sig att föreslå flygresor?


Tänker du åka bil ner, men vill gärna ha hjälp med andra beställningar? Hur länge tänker du stanna i Schweiz? Och i Luzern? Tänker du överhuvudtaget åka till kongressen?



Det är för att få svar på sådana frågor, som vi har bifogat ett frågeformulär. Skicka det till oss, även om du är osäker om du ska till Schweiz. Vi vill bara veta, vad som är önskvärt att vi anordnar. Vi vet ännu ingenting om priser, men våra första undersökningar tyder på att vi kan få ett flygpris som ligger ungefär i samma prisklass som ordinarie tågbiljett.

Fyll i blanketten även om du redan bestämt dig att ta bil till Luzern.

En sak till: kortet är portofritt. Du behöver inte sätta frimärke på det. Kan du kryssa i rutorna redan denna vecka, så att vi kan förbereda kongressresan i god tid i år. Det är först när du får reda på alla detaljer som du ska ta ställning om du vill följa med eller inte.



Det är SEJUs medlemsblad

Känner du till *ktp*? Inte? Det är SEJUs medlemsblad och SEJU är, som du vet, Esperantoförbundets ungdomssektion.

ktp har nysst utkommit med nummer 16 och har hållit på i fyra år. Det kommer ut i stället för *kvinpinto*, som var SEJUs tidigare tidning.

Nummer 16 är på 7+2 sidor i A4 och innehåller artiklar om ungdomsarrangemang och om språket esperanto. Just nu heter redaktören Leif Gunnar Karlsson, som bor i Kiruna.

Vill du följa SEJUs arbete? Då ska du prenumerera på *ktp*. För årets fem nummer betalar du tio kronor. Nästa år kommer *ktp* att kosta 15 kronor. Postgirot är 51 33 01 - 2, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Om du går och undrar vad *ktp* står för, så är det *kaj tiel plu*, och så vidare. Det tycks vara en markering på att esperantarbetet fortsätter och kommer att fortsätta.

Här är några till till Klubo Cent

Ytterligare några har 'anmält' sig till **Klubo Cent**, nämligen Hjalmar Örtenblad i Ljungaverk, Dagmar Dahlberg i Örebro, Henry Almar i Uddevalla och en till som inte vill bli nämnd i tidningen.

Esperantoförbundet tackar alla dessa för deras extra bidrag, som gör det möjligt att utöka verksamheten. Du vet, att 'medlemsavgiften' är 100 kronor utöver medlemsavgiften.

Kan det vara värt det?

Vad får en kurs kosta?

Esperantoförbundet får ganska ofta reklam om olika kurser, som arrangörerna tycker att vi behöver vara med på. Och de har säkert rätt. Vi skulle behöva lära oss mycket om hur vi ska sköta en organisation.

Helt nyligen kom inbjudan till en kurs om medlemsvärvning. En intressant kurs. I den snygga trycksaken som vi fick i brevlådan kunde vi läsa lite om kursens uppställning. Låt oss citera lite:

«Vid tidigare kurser i medlemsvärvning har det visat sig att deltagarna anser dessa punkter mest väsentliga:

Medlemsvärvningens förutsättningar
att definiera de starka och svaga sidorna
att formulera mål, välja strategi.

Medlemsvärvningens ekonomiska aspekt
att bedöma vad en ny medlem får kosta.

Marknadsföring, kommunikation
att tillämpa teorier i det praktiska jobbet.

«Produkten»
att avgöra vad medlemmen vill ha, bör få och kan få för medlemsavgiften
att inventera och prioritera argument.

Planera, genomföra, följa upp
att välja målgrupp
att formulera budskap
att välja media, beräkna kostnader

att producera, t ex trycksaker
att sälja in åtgärderna — internt och externt
att utvärdera, mäta effekter

Än sen då?
att tillämpa kursen på de egna problemen
att dra nytta av kursdokumentationen».

Vi behöver inte gå på denna kurs. Vi kan, utan att ha hört ett enda ord börja tillämpa den i praktiken. Kursen kostar 1 400 kronor för två dagar, och för det får man inte ens en bit mat.

Det innebär att vi skulle behöva få en 50 nya medlemmar bara för att täcka den kostnaden.


Jämför med våra egna arrangemang: SEJUs i Enköping för 100 kronor, inklusive logi och mat, eller Esperantoförbundets

i Jönköping för 200 kronor, också *inklusive logi och mat*. Dessutom för tre dagar.

Eller tänk på världskongressen: omkring 300 kronor för en hel vecka! Visserligen får man betala logi och mat extra, men det är så mycket som man får för det. Vad skulle kostnaden bli om en sån svensk firma fick sköta det? Tiotusen?

En ny broschyr om esperanto idag

Esperantoförbundet har återigen gett ut en ny informations-broschyr. Den heter *Esperanto idag* och har samma innehåll som den nyligen utgivna utställning med samma namn.



Broschyren är i A4 format, tryckt i svart och grönt på fint 115-grams bestruket papper. Inte glänsande, för att göra den lättläst. Mera behöver vi inte säga om den. Styrelsen för SEF har nämligen beslutat att alla medlemmar ska få var sitt exemplar, åtminstone ett per familj. Det kommer i början av november.

Denove forpasis kelkaj aktivuloj

En preskaŭ ĉiu numero ni havas la malĝojan taskon informi pri forpaso de fidelaj kaj ĝis lastmomente aktivaj membroj.

Lastatempe du forpasoj preskaŭ samtempaj pene sentiĝas en la Esperanto-societo de Karlstad. Mortis tie **Ivar Runfeldt** kaj **Gustav. R. Johansson**. Ili ambaŭ esti pioniroj en nia movado. Ili aliĝis en la tridekaj jaroj kaj dediĉis sin kun entuziasmo al la ideo de internacia lingvo kaj la idealo de Zamenhof; al ili ili restis fidelaj ĝis la fino. Tio estas grava perdo, ne nur ĉar ili estis membroj, sed ankaŭ ĉar ili estis karaj amikoj de ni ĉiuj.

La societo de Karlstad inten-

cis ĉijare celebri sian 25-jaran jubileon. Por tiu okazo Gustav fervore okupis sin per kompilado de la historio de la esperantomovado en suda Vermlando. Tiun gravan laboron nun alia devos plenumi.

La lan de oktobro mortis la prezidanto de Umeå Esperanto-Klubo, **Alvar Boström**. Li tre interesiĝis pri lingvoj kaj speciale pri esperanto. Antaŭ kelkaj jaroj li produktis la bildrakonton pri Samelando, kiu estas tre ŝatata de la esperantistoj.

En Sollefteå forpasis **Ada Myhrman**, kiu siatempe multe aktivis en la esperantomovado; ŝi estis dum multaj jaroj prezidantino de la klubo de Sollefteå.

Ni forte sentos ilian mankon. Ni samtempe sendas niajn kondolencojn al la familianoj.

Favoraj signoj el orienta Eŭropo

En 1978 disvolviĝas la agado de esperantistoj en landoj de orienta Eŭropo, kie la esperantomovado ne havas tute oficialan karakteron. Tiun disvolvон signas plej evidente publikigo pere de oficialaj ŝtataj instancoj de publikaĵoj en esperanto.

En Moskvo aperis ĉijare jam dufoje esperantlingvaj aldonoj al la cetere anglalingva semajna gazeto *Moscow News*. Unufojon estis aldonita esperanta traduko de parolado de Leonid Breĵnev, alian traduko de la soveta konstitucio. Krome jam komence de la jaro radio Moskvo disaŭdigis programon en esperanto kadre de la itallingvaj dissendoj. Laŭdire tio poste ripetigis, sed pri tio mi ne tute certas.

Ĉiuj kongresanoj en Varno ricevis koloran revuon kun la titolo *Ferioj en Rumanio*, kiun eldonis la turisma ministrejo de Rumanio.

Preskaŭ samtempe venis ankaŭ informoj pri vastiĝanta agado en tiu lando kaj pri scienca agado. Partopreno de rumana delegacio en Varno ankaŭ estis signo de plivigliĝo.

Aperis jam informoj, ke la sovetaĵ esperantistoj ricevis aprobon de la ŝtataj aŭtoritatoj starigi tutlandan organizaĵon kaj aperigi propran revuon. Ne ĉio estas ankoraŭ preta rilate al tiu aprobo (oni ankoraŭ laboras pri la regularo de la starigota organizo), sed tiuj signoj estas tre esperigaj. Sovetunio ĉiam estis unu el la landoj kun plej granda kvanto da esperantistoj. Estus tempo bonvenigi ilin ankaŭ en la sino de la internacia organizaĵo UEA.

HODIAŬ



Kelkaj neniam ĉesas esti strutoj

Kelkaj neniam ĉesas esti strutoj. Vi scias, kio estas strutoj, ĉu ne? Sudafrikaj birdoj, kiuj kaŝas sian kapon en la sablon, kiam ili rimarkas danĝeron. PIV donas bonan ekzemplon pri struta agado: «strute fermi la okulojn antaŭ la faktoj». Kaj ĝustetion multaj faras rilate al esperanto. Ili decidis, ke esperanto ne ekzistas kaj fermas la okulojn, kiam ili rimarkas la kontraŭon.

Sur paĝo 44 Ingemar Nordin donas bonan ekzemplon pri struta reago al esperanto dum la Freinet-konferenco en Ärjäng: «esperanto ja estas mortinta lingvo!» Similan senvortan strutan reagon oni povis rimarki ĉe la grandĵurnalaj, radiaj kaj televidaj raportoj pri tiu konferenco. La «strutoj» kompreneble ne vidis esperanton!

Alia ekzemplo pri «strutismo»: Ni havas membron, kiu estas profesia verkisto. Li jam publikigis dekon da libroj kaj lia nomo estas konata. Leginte pri la esperantomovado en Irano, li ekverkis longan artikolon pri tiu fenomeno kaj proponis ĝin al la grandaj ĵurnaloj de Stokholmo. Jen ilia reago:

*Ĵurnalo A: «Bedaŭrinde ni ne samopinias kun vi pri kio interesas la legantojn de ***. Kaj ĉar ni havas malmulte da spaco kaj multe da materialo, ni resendas vian artikolon.»*

Ĵurnalo B: «Dankon pro via artikolo pri esperanto. Ĝi donas informojn, kiuj por mi estas novaj kaj surprizaj. Sed mi devas tamen rifuzi...»

Ĵurnalo C: «Bedaŭrinde ni ne kredas, ke la interesiĝo pri tiu ĉi fenomeno ĉe la legantoj estas sufiĉe granda por dediĉi tiom da spaco al ĝi.»

Ĵurnalo Ĉ: «Esperanto estas laŭ multaj rilatoj interesa ideo, kaj estas interese, ke ĝi pluvivas kaj aktualiĝas, sed ni devas bedaŭrinde rifuzi vian artikolon...»

Kaj tiel plu. Tro longa. Ne interesas al niaj legantoj. Tio, kion oni ne volas vidi, ne ekzistas. Kelkaj neniam ĉesas esti strutoj.

Franko Luin

Esperanto var med på RIDEF i Årjäng

Som man hade hoppats blev esperanto kongressspråk nr 2 efter franskan under sommarens internationella lärarkongress i Årjäng. Alla anföranden under gemensamma samlingar tolkades från franska respektive svenska till esperanto. Allt som skrevs i form av informationer och rapporter skrevs också på esperanto. Och i arbetsgrupperna liksom under fritiden användes esperanto som kommunikationsmedel i de fall detta var nödvändigt. Det måste emellertid erkännas, att behovet i det senare avseendet var mindre än «önskvärt». De som var helt beroende av esperanto var få, mest några ungrare, polacker och svenskar, men givetvis också de många fransmän som ville kommunicera med dessa grupper.

Som helhet blev kongressen en god propaganda för esperanto. Som esperantist med några kunskaper i franska märkte jag vid tolkningarna, hur myc-

ket de enbart «fransktalande» svenskarna gick miste om. Det framstod klart, hur överlägset esperanto är vid sådana här tillfällen, när det gäller att tolka synpunkter och åsikter från ett nationalspråk till ett annat. De svenskar som deltog i förkongressen, som var helt esperantistisk, blev ett fint bevis på hur snabbt det går, att genom esperanto skaffa sig ett medel att kommunicera med personer från ett annat land. Här fanns svenska deltagare med inga eller ringa förkunskaper, som efter de tio dagarnas esperantokurser kunde samtala med andra länders esperantister och t o m hjälpa till med tolkning, när de «fransktalande» svenskarnas färdigheter var otillräckliga.

För många svenska deltagare var esperanto en överraskning. Att språket fortfarande finns och används. Man och man emellan diskuterades esperanto bland svenskarna. Positiva kommentarer hördes, men även

negativa: esperanto är ändå ett «dött» språk!

Kongressen uppmärksammades mycket i pressen, mest i lokaltidningarna i Västsverige, och i dessa reportage omnämndes att esperanto var kongressspråk. Av större tidningar hade åtminstone *Göteborgs-Tidningen* en artikel med samma omnämnande.

Som slutfacit kan man konstatera, att 230 lärare från 14 länder for hem efter de två veckornas vistelse i Årjäng, där deras öron dagligen utsatts för esperanto, och med en försvarlig hög dokumentation skriven på esperanto.

* * *

Årjäng är en stor sommarturistort. Under juli månad arrange-

Det var Werner Halvarsson från Östervallskog, från wildaste skogen tätt vid gränsen till Norge, som var «i stan» för att lyssna till Tore Skogman m fl. Han är handikappad, förtidspensionerad efter hårda år i skogen. Som funnit en angenäm och meningsfull sysselsättning i esperanto med korrespondens med och resor till främmande länder.

Så bra började det. Det blev förstas besök hos Werner om några dar av de 60 deltagarna i förkongressen med kameror och massäck. Det finns gott om älgar i Värmlands skogar och ingen ville åka tillbaka till Frankrike utan att ha fotat en älg.

Det var inte många svenska deltagare i för-RIDEF. Men



— SEJU —

Tre dagar med SEJU: såklart du ska dit!

Den 10, 11 och 12 november ordnar SEJU en mysig träff för alla esperantoungdomar. Den kommer att äga rum i vandrarhemmet Bredsand vid Mälaren, 6 km från Enköping.

Vilka är välkomna?

Experter, nybörjare och blivande nybörjare, i salig blandning. Huvudsaken är att man är intresserad av esperanto och gillar att vara tillsammans.

Vad för en träff?

Det finns tusen orsaker till att man vill träffas. Ett av målen är att visa, att esperantoträffar inte behöver vara tråkiga tillställningar.

Det definitiva programmet spikas tillsammans, så man är särskilt välkommen om man har förslag med. Man vill sjunga och dansa, laga mat, äta och dricka, göra en enkät i staden, diskutera propagandametoder

för esperanto och ha rejäla språkövningar. Men säkert kommer en del oförutsett att inträffa.

Och vad kostar kalaset?

100 kronor för rubbet, både mat och logi. Dessutom vill man på något sätt utjämna resekostnaderna. Du betalar 100 kronor till postgiro 6 34 69 - 1, Guy Coste, så är du anmäld.

Vad mer?

Glöm inte att ta med lakan eller sovpåse (inte sovsäck!), sångböcker, instrument, bandspelare, papper, penna, oömma varma kläder och bra skor, ditt allra bästa humör och lusten att göra denna träff så bra som möjligt.

Om du inte vet hur du kommer till Bredsand, ring någon i SEJU, t ex Sven Jonsson, tel. 018 - 11 98 25. En karta och tidtabell med lämpliga tåg har följt med senaste *ktp*.

rar köpmännen där en massa, som kallas «juli-jula». Det är ett enormt pådrag med Tore Skogman och Lindqvistarna och dans på torget mm, som samlar människor i 10 000-tal.

Mitt i detta evenemang började för-RIDEF. Familjen Gentle från Avignon i Frankrike stannade med sin husvagn på Storgatan, och fru Helene gick ut för att fråga efter vägen till skolan, där kongressen hölls. Hon gick ut i folkvimlet och funderade samtidigt på vad hon skulle säga, för hon kan bara franska och esperanto. Bland de tusentals människorna gick hon rakt fram till en man och upptäckte — att han bar en esperantostjärna på rockslaget!

det var några. Dessutom kom svenska esperantister på besök för en eller några dar. Klubben i Karlstad var först och ordnade sen ett uppskattat återbesök i Karlstad. Från Göteborg kom man i fyra omgångar. Örebro sände några representanter en dag och från Stockholm fanns esperantister under hela tiden.

Kollisionen i tid med Varna-kongressen hindrade många att komma. De som kom gjorde en värdefull insats. Ingen må missstycka, om jag nämner en vid namn: Asta Håkansson från Ystad, den första svenska Freinet-läraren. Hon gjorde en fantastisk insats med sin närvaro under kongressen.

Ingemar Nordin

ALLT!

ALLT FÖR KURSERNA

Se annonsen i föregående nummer av *La Espero*, eller sänd efter listan över kurslitteratur; mot 1,— kr i frimärken från

Esperantoförlaget, Fack, 200 42 Malmö

Familia vivo, modelo 1910-20

El la paperoj produktitaj en Årjäng ni ĉerpas rakonton de Asta Håkansson, kiu aperis en la kalendaro de la laborgrupo «Familio». Jen kion rakontis Asta:

«La tria infano naskiĝis, kiam mi ne estis ankoraŭ kvinjaraĝa. [Asta naskiĝis en la jaro 1903] Se la gepatroj ne estis hejme, mi devis zorgi pri la bubo. Por doni al ĝi la suĉbotelon, mi devis supreniri sur benketon. Iom post iom la familio pligrandiĝis. Kiam mi havis 15 jarojn, naskiĝis la oka infano.

La familio estis malriĉa. Kompreneble la malriĉaj familioj disponis la plej malbonajn loĝejojn. Kiom da siteloj plenaj de akvo mi devis porti! Kaj ankaŭ la vestojn de ĉiuj mi devis lavi!

Kiam mi estis 13-jara, mi estis devigata forlasi la lernejon por helpi mian patrinojn. Mi ŝatis legi, sed tion ŝi ne permesis, ĉar ŝi opiniis, ke tio perdigas tempon. Kelkfoje mi iris al alia familio, kiu bezonis helpon. Kiam mi estis 15-jaraĝa, mi estis dungita en butikon sabate kaj dum la libertempo.

Dum la vintro ofte mankis al ni mono por aĉeti la nutraĵojn. Mia patro estis ŝtonhakisto kaj ankaŭ forĝisto, sed en tiu sezono li ne trovis laboron. Unu fojon mi svenis en la lernejo, ĉar mi ne manĝis matene. La instruistino, kiu komprenis la kaŭzon, dividis sian manĝon kun mi. Ŝi permesis, ke mi restu hejme por helpi la patrinojn. Dum la lasta jaro mi vizitis la lernejon dum nur 30 tagoj; ŝi sendigis al mi la farotajn taskojn. Kiam venis la tempo de la ekzamenoj, ŝi vokis min, kaj mi pruvis, ke mi bone laboris.

Kuraciston mi vidis nur unu fojon. La patrino akompanis min, ĉar tiutempe la infanoj ne rajtis paroli. Ŝi diris al li, ke mi dum la pasinta vintro suferis dorsdolorojn. Li staris sur la sojlo, ne ekzamenis min, kaj respondis: «Tio pliboniĝos». [Asta estis malsana pro poliomjelito. Epidemio regis tiam en la regiono.]

Tamen, por fariĝi instruistino, mi devis daŭrigi la studadon. La instruistinoj de miaj fratoj proponis helpon. Sed necesis pagi, kaj tion mi ne povis. Dank' al unu el ili oni postulis de mi nur 200 kronojn anstataŭ 800. Sed eĉ tiun sumon mi ne dispo-

nis. Iam la direktoro diris al mi: «Kiam mi ricevos miajn 200 kronojn?» Tion aŭdis la tuta klaso ...

Kelkfoje, je la deviga tago, ni ne disponis la monon por la luprezo de la domo. Tiam oni diris al mi: «Vi devas foriri!» Eĉ kiam oni povis pagi post du aŭ tri tagoj, oni metis niajn meblojn en la korton kaj ni devis forlasi la domon. Mi memoras, ke trifoje, kiam mia patro estis for serĉanta novan loĝejon, mi enmetis la nutraĵojn en kestojn kaj iris al najbarino.

Kiam mi estis 22-jaraĝa, mia patrino fariĝis nervmalsana kaj mia patro ne plu povis elteni.

Tamen ĉiuj kunlaboris hejme, helpis unu la alian. Mia plej juna frato bezonis ĉiusemajne 2 ŝtupojn por povi partopreni en aktivecoj de la lokaj skoltroj. Sed li preferis forlasi la grupon ol pligrandigi niajn malfacilaĵojn. Ĉiuj bone konsciis pri la situacio, estis ŝparemaj. Neniu postulis ion de la familio. Mia patro estis kuraĝa laboristo, ne trinkis alkoholon. Liaj zorgoj celis nur la familion.

De kiam mi estis 22-jaraĝa mi devis zorgi pri la familio, pri miaj gepatroj, kaj mi tute ne havis la intencon fondi propran familion. Mi loĝis en la orienta parto de Borås, industria urbo kun teksuzinoj. Ni tamen ne estis la plej malriĉaj. Pli poste, kiam mi estis instruistino en tiu urbo, mi povis vivi denove mian infanecon rigardante miajn gelnantojn. Estis inteligentaj geknaboj. Dum la afero Sacco kaj Vanzetti iu el ili ekstaris en la klaso kaj diris (li estis 7-jaraĝa):

«Sacco kaj Vanzinetti estas senkulpaj».

Dum la unua mondmilito mankis al ni terpomoj. Hejme ni estis dek personoj: ni disponis pri dek nutraĵkartoj. Iam disdono de sekigitaj terpomoj estis anoncata. Paĉjo diris al mi: «Prenu la dek kartojn kaj iru vicumi». Mi foriris sen ŝuoj. Kiam mia vico venis, oni rigardis min kaj diris al mi: «Ĉu tio estas por ci?» «Helpu min meti tiun sakon sur la dorson, poste mi portos ĝin». Mi ne povis halti por ĝin demeti teren; sola mi ne povus ĝin denove ŝarĝi. Mi supreniris la ŝtuparon, frapis la pordon ... per la piedo. Oni malfermis al mi. Ĉiuj staris sur la sojlo kaj ridegis. Sed mi tiam tute ne emis ŝerci. Tiutempe la svedoj preskaŭ malsatis, ĉar ni devis provizumi Germanion. La sveda reĝino estis germandevena.

Pli poste, kiam mi estis instruistino en la arbaro, la gepatroj de miaj gelnantoj estis arbohakistoj. Kelkfoje ili ne povis sufiĉe vesti siajn infanojn. Mi jam spertis la suferon pro la malvarmo; tiam mi proponis vestojn jam portitajn de mi aŭ de miaj parencoj. La patrinoj bone sukcesis ilin aranĝi por siaj infanoj kaj ili iĝis amikinoj miaj. Oni ne plu diris al la junaj: «Venontan jaron vi iros al la lernejo», sed: «Vi iros kun fraŭlino Håkansson». Kaj iliaj gepatroj ne estis malkontentaj, kiam la infanoj, kiuj malbone sukcesis sian lernejan jaron, estis devigitaj rekomenci en mia klaso, ĉar ili pli longan tempon restis kun mi.

Mi neniam havis eblecon lerni fremdan lingvon: nek la anglan, nek la francan, nek la germanan. Kiam mi estis en la arbaro mi lernis esperanton per koresponda kurso. Tio kostis al mi unu kronon. Vi povas konstati, ke tiu krono ne estis malbone uzita.»

Tion ĉi rakontis Asta al la laborgrupo pri familio en Årjäng. Dank' al letero de franca kolego Asta aŭdis por la unua fojo pri Freinet. Ŝi partoprenis al CEL-kongresoj, kie gesamdeanoj de la movado instruis al ŝi la teknikojn de la moderna lernejo. Iun tagon ŝi kunportis al Svedio du lerneajn presilojn. Esperantisto, tipografo en Stokholmo, sukcesis trovi por ŝi malnovan sortimenton de preslitoj. Jam en 1949 ŝi uzis en sia klaso la Freinet-teknikojn: liberteman tekston, infanjurnalon, internaciajn interŝanĝojn pere de esperanto. Kiam Asta emeritiĝis en 1964, ŝi estis ankoraŭ la sola en Svedio, kiu praktikis la Freinet-teknikojn.

Ett måste!

LA TRIGROŜA ROMANO

Bertold Brechts «Tolvskillingsopera», nu med sänkt pris. Med moms 90,—

KANTO PRI FAJR-RUĜA FLORO

av J. Linnanskoski, en av de största finska författarna. Boken är filmad. «Ett juvelo de la finna litteratur». Med moms 55,—

FAULHABER RAKONTAS

humoristiska småberättelser av f. akademiledlemmen och föredragshållaren F. Faulhaber. Med moms 10,50

GUDRUN

roman av den danske Nobelpristagaren J.V. Jensen vill vi påminna om. En ung kvinna i Köpenhamn ... Med moms 26,—

IZOLO

av K. Kalocsay. «La poemaro enhavas plurajn el la plej belaj lirikoĵoj iam verkitaj en esperanto». Med moms 45,—

FRITHJOF-SAGAO

Tegnér's Frithjofs saga är ett fynd för varje bibliotek och utställning och en underbar gåva på högtidsdagar. Med moms 115,—

Alla priser är något rabatterade

ESPERANTOFÖRLAGET

Fack, 200 42 Malmö, postgiro 578 - 5

Visst skrivs det om esperanto – i lokalpressen

Karl Gustavsson har bläddrat bland tidningsklipp som samlats på hög under hela första halvåret och lite till och hittat bl a följande:

Under rubriken «Satsa på esperanto» skriver Leif Gunnar Karlsson, Kiruna, i *Norrländska Socialdemokraten*/ungdomsredaktionen: «För några år sedan var FN:s språkkostnader över 100 miljoner kronor. Det är kostnaden för översättning och tolkning mellan de fem arbetspråken engelska, franska, kinesiska, ryska och spanska. Sedan dess har ytterligare ett arbetspråk införts, nämligen arabiska.

Kan inte pengarna användas på ett bättre sätt? Naturligtvis! T. ex. till kampen mot fattigdom och svält».

Skövde Nyheter har de senaste månaderna innehållit ett helt dussin större eller mindre artiklar om esperantos roll i olika sammanhang. Exempel: «Tusentals västsvenskar såg Tibrobarnteckningar», «700 000 dollar till svältande användes till översättningar!», «Esperanto gör succé i Iran».

Nerikes Allehanda och *Örebro-Kuriren* refererar: «200 000 utrotade i oroligt Burundi», berättade i sitt föredrag i Örebro skolexperten Justin Minani, som studerar pedagogik och doktorerat i Frankrike över ämnet «den svenska grundskolan».

«Kasper från Odebacken tar farmor med till Norge» — artikel i *Nerikes Allehanda* den 2 mars om dockteater med esperantos medverkan i bl a Moskva, Göttingen och Oslo.

Arbetet i Malmö presenterar i mars 1978 Arthur Svensson, som vill skapa ett alldeles eget och nytt världsspråk — vilket i ordningen blir det manne?

I *Göteborgs-Posten* pläderar författarinnan Astrid Pettersson från Lindome för «det verkligt internationella språk, som redan finns världen över, teckenspråket», som döva och hörselskadade använder i umgänget över språkgränserna. «Vem minns inte esperanto, som fortfarande har sina förespråkare», frågar hon i detta sammanhang.

Ja, nog har det fortfarande sina förespråkare. Över 4 500 sådana från närmare 50 länder samlades till kongress helt ny-

ligen i den bulgariska staden Varna vid Svarta Havet!

Om SEF-kongressen i Uppsala i april rapporterar *Uppsala Nya Tidning* med en artikel och konstnärligt tecknad publikbild under rubriken «Esperanto ett sätt att råda bot på språkproblem». Även andra tidningar uppmärksammade årsmötet och ordförandeskiftet Strönnö-Lindblom jämte paneldebatten om «Språkproblem i internationell kommunikation».



Citat plockade av Karl Gustavsson

talande länder. Ett föredöme för internationell verksamhet, där ingen har någon förmån av att få tala sitt modersmål, och där ingen behöver känna sig eftersatt och underlägsen för språkets skull».

Andra norrländska tidningar med positivt inställda artiklar om esperanto är *Norra Västerbotten*, *Västerbottens Folkblad*, *Sundsvalls Tidning* och *Dagbladet* i Sundsvall, som bl a ägnar «jättekongressen i Varna» stor uppmärksamhet.

Mora Tidning berättar den 2 augusti, att «Vasaloppsåkare från Tjeckoslovakien varit på besök hos esperanto-vän i Mora». Åren 1969, 1970 och 1973 hade Milon Nyc från Liberec i Tjeckoslovakien deltagit i Vasaloppet, men nu kom han på

besök i sällskap med sin hustru Jirina till sin vän Helge Frisk med familj i Mora.

Aftonbladet skildrar i augusti Freinet-lärarnas kongress, som ägde rum i Årjäng i månads-skiftet juli-augusti. Esperanto spelade där en viss roll som konferensspråk; mötet bevisades av 250 pedagoger från femton länder. Till stora delar överensstämmer Freinet-pedagogiken nästan ordagrant med den läroplan som gäller för den svenska grundskolan, konstaterar deltagarna.

Förutom ovanstående axplock har esperanto varit föremål för uppmärksamhet i många olika tidningar i olika delar av landet, artiklarna ofta verkingsfullt illustrerade med situationbilder.

Även radion har (fastän sparsamt) sysslat med ämnet esperanto. *Radio Västmanlands* frågestund i början av året har redan refererats, lokalradion i Örebro har intervjuat Kerstin Rohdin och *Radio Västernorrland* pratat med Thorsten Farm i Sundsvall, medan riksradiion veterligen inskränkt sig till ett omnämnande av den kände finske vissångaren M.A. Numminen i programmet *Kulturfontäret* i mitten av april.

Bergslagsbladet den 3 maj innehåller referat om kursavslutning hos Internationella Klubben i Köping, som en termin studerat esperanto - «ett ämne som ligger naturligt till för just den föreningen».

Norrskensflamman, «Aktuell i dag», 5 maj: «Stor kampanj för esperanto — Världsspråket med arbetartraditioner».

Gotlands Tidningar skriver i juni om Visbybon Åke Engström (21) under rubriken «Lektor måste lära sig esperanto för att bedöma hans specialjobb». Här handlar det alltså om de universitetsstudier, som den unge mannen bedriver vid sidan om sitt arbete på en minkgård.

I *Söderhamns-Hälsinge-Kuriren* berättar den 9 juni KG om sina och hustruns upplevelser vid deras «volontula servo» i Rotterdam på UEAs centralbyrå i maj månad. «Sju nationer men inga språkproblem» lyder en av underrubrikerna, där bl a kan läsas: «Anmärkningsvärt nog — tycker antagligen många — hör man ingen tala annat än esperanto sinsemellan, även de fyra tjänstgörande som hade kommit från tre olika engelsk-

Nur 7 kr

kostos al vi numero nulle la unika aktuala semajna revuo en esperanto

SEMAJNO

kun multaj interesaj artikoloj sur 40 paĝoj. Leginda por esperantisto de ĉiu lando, ĉiu aĝo, ĉiu medio. Konvinkiĝu mem!

Mendu per pago de 7,- kronoj al Esperantoförbundet, poŝtgiro 578 - 5

De Venezuelo al Irano: trovu korespondanton!

Gesamseksemuloj! Ekstas nova Ligo por vi. Por informoj sendu internacian respondkuponon al Peter Danning, 44 Morley Road, Twickenham, TW1 2HF, Anglujo, aŭ al Christian Lauridsen, Thulevej 38, DK-9210 Ålborg SØ, Danlando

Ĉu vi ŝatas krucvortenigmajn? Jen vi havas ŝancon aĉeti 50-paĝan libron *Krucenigmaj kaj humuro* de Stano Marček kaj Stano Markovič. Ĝi konsistas el humuraj desegnoj kaj diversformaj enigmoj. Nur 7 ekzempleroj estas ankoraŭ haveblaj por nur 15 danaj kronoj aŭ 6 internaciaj respondkuponoj ĉe Poul Kry Poulsen, Benløseparken 19, DK-4100 Ringsted, ĝiro 828 94 76

KORESPONDI DEZIRAS:

23-jara bulgaro kun junaj gesvedoj pri ĉiuj temoj. Eŭgeno Georgiev, str. Bačo Kiro 35, BG-1202 Sofio, Bulgario

Irana esperantisto, 23-jara, atendas multajn leterojn. Uahid Wishlagi, 172 Rokhodiny golstany, Hartehanav, Tehran, Irano

32-jara juristo hungara ŝatus ligi kontakton kun 18-30 jaraj gejunuloj, volonte geedzaj paroj Interesiĝas pri foto, muziko kaj sporto. Dr Tikász Attila, József A. u. 5, H-4100 Berettyóujfalu, Hungario

Venezuela studentino de biologio atendas viajn leterojn. Aura Esther Zambrano, 7a transversal, Av. Los Castanos, Quinta

Luz Mara, El Cementerio, Caracas, Venezuelo

15-jara lernantino el Ĉeĥoslovakio tre ŝatus interŝanĝi bildkartojn kaj memorajojn. Jana Matušková, Komenského 22, CS-678 01 Blansko, ĈSSR

21-jara studento, nun soldatservanta, deziras korespondi por ekzerci esperanton. Joao Pasadas da Graca, B. Dr António Souto Lopes 2, 2. esq., Moscovide, Lisboa-6, Portugalio

Pola sinjorino serĉas kontakton kun gesvedoj. Irena Wojnowska, Al. Leningradzka 32/2, PL-80-824 Gdańsk, Pollando

50-jara brazilano atendas leterojn. Adolpho Ramires, Rua Macedo Sobrinho 38/107, 20 000 Rio de Janeiro, Brazilo

Diplomita inĝeniero-kemiisto, 35-jara kaj alta, bonvenigus viajn leterojn. S-ino Veneta Trifonova, Aleko Konstantinov 39 A, Sofia 1505, Bulgario

14-jara japano, kiu lernas esperanton per ĉiuj siaj fortoj serĉas korespondamikojn en Svedio. Hideki Takada, 26 Wakamiya 4 chome, Nakamura-ku, Nagoya aichi, Japanio

Pri fervojaj modeloj interesiĝas 37-jara hungaro. Stefano Löw, Damjanich u. 184, H-3600 Ozd I, Hungario

Jurnalistino el Venezuelo serĉas gekorespondantojn. Marisela Arebalo R., Ave. Bogotá, Edif. Marben, Apartamento C, Los Caobos, Caracas, Venezuelo
Gekorespondantojn en norda Eŭropo serĉas Viliam Hájov-

ský, Urbánkova 2901, CS-92101 Piešťany, Ĉeĥoslovakio

20-jara portugala junulo bezonas ekzerci esperanton. José Ernesto Figueiredo Lourenco, R. dos Miosótis, Bloco 43-2.C., Bairro Primavera, Sacavem, Portugalio

Geografio, arto kaj muziko estas la interesiĝoj de 15-jara polino. Anna Witowicz, Potok 314, PL-38-404 Krosno, Pollando
Venezuela studentino de psikologio kaj instruistino de surmutaj infanoj volonte korespondus en esperanto. Gilda Isabel Pacheco D., Castillo a Termopilas No. 07-07, La pastora, Caracas 01-15, Venezuelo

Patro kaj filino deziras ricevi korespondantojn. Cvetan Gergov estas la patro kaj li estas 42-jara inĝeniero. Daniela Milanova estas 15-jara lernantino. Ilia adreso estas: ul. Vasil Dimitrov bl. 244, vh E, ap 77, BG-1680 Sofia, Bulgario

16-jara studentino de ekonomio interesiĝas ankaŭ pri aliaj temoj. Hanna Ŝevetkova, Kapitana

Jarsee, CS-54100 Trutnov, Ĉeĥoslovakio

34-jara sekretariino en universitato, kun edzo kaj unu filo volonte korespondus kun instruistino. Interesiĝas pri preskaŭ ĉio (psikologio, lingvistiko, edukado, turismo, fotografado, dancarto, muziko, legado, manlaborado, kuirado, spacesplorado ktp). Rozalia Prenoszil, Menyecske u. 3, H-1112 Budapest, Hungario

Universitata Centro de Esperanto serĉas korespondantojn por siaj membroj. Centro Universitario de Esperanto, Universitad Central de Venezuela, Apartado 76626, Caracas 107, Venezuelo

Volonte akceptos gastojn Eugeniusz Wozniak, str. Sasiednia 3, PL-26-600 Radom, Pollando

35-jara kuracistino deziras korespondi kun svedaj samideanoj

25-jara japana fraŭlo, terkulturisto, ankaŭ serĉas amikojn. Chikayuki Matsumoto, 301 Sakurazawa, Yorii-machi, Saitama, 369-12 Japanio

AVGIFTER LUZERN 1979

(gäller till 31 december 1978)

1. Icke medlem i UEA	347 skr
2. Medlem med årsbok	300 skr
3. Medlem med årsbok och «esperanto»	232 skr
4. Make/maka till (1)	242 skr
5. Make/maka till (2) eller (3)	210 skr
6. Ungdom t o m 20 år	105 skr
7. Heltidsstuderande t o m 30 år	173 skr
8. Synskadad	139 skr

Betalningar till postgiro 14 74 29 - 5, Sv. Esperantoförbundet, Specialkonto, Malmö.

Upplysningar och anmälningsblanketter hos fru Ester Andrén, Regementsgatan 27 d, 217 53 Malmö, telefon 040 - 6 52 09.

Konstrui per

YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure



YTONG AB

Jes, ni povas lerni multon el Hungario

En aŭgusto vizitis Svedion vicprezidanto de Hungara Esperanto-Asocio, parlamentano Endres Bárat, kun sia familio. Iun vesperon ni kaptis la okazon babili kun li pri la esperantomovado en Hungario kaj pri esperanto ĝenerale. Dum la babilado, kiun partoprenis ankaŭ Roland Lindblom kaj Franko Luin, funkciis magnetofono. Multo pli estis dirita ol staras en tiu ĉi intervjuforma artikolo. La babiladon ni komencis per demando pri la agado en la hungara parlamento rilate al esperanto.

—Estas kelkaj esperantistoj en la hungara parlamento, kiuj kompreneble bone konas pri esperanto, pri la lingvo kaj la movado, kaj ankaŭ pri Hungara Esperanto-Asocio. Tiuj kelkaj esperantistoj informadis pri esperanto al siaj kolegoj parlamentanoj kaj ĉiuj, kiujn ili demandis, subskribis leteron, kiu atentigis ke esperanto estas uzebla kaj en scienco kaj por pli bona interkompreniĝo kaj amikiĝo inter la popoloj, kiujn la hungaroj bezonas, apud la aliaj fremdaj lingvoj, lerni ankaŭ esperanton. Tiun leteron ricevis la gvidanto de la kultura komitato de la hungara parlamento, kaj la komitato pritraktos ĝin. Ĝi helpas en la fremdlingva instruado en Hungario, inter alie al esperanto.

—Sed jam nun okazas kursoj pri esperanto en diversaj lernejoj.

—Jes, en Hungario oni jam pli ol 10 jarojn instruas esperanton en la universitato en Budapeŝto, kaj multaj studentoj povas kiel trian fakon elekti esperanton, faris ekzamenon kaj havas ŝtatan diplomon pri tio. Ili povas fariĝi profesoroj de esperanto [instruistoj en gimnazio

laŭ la sveda lingvouzo] kaj interlingvistiko. Tio estas tre granda rezulto. Kelkaj pedagogiaj altlernejoj ankaŭ instruas esperanton kaj tie elementlernejaj instruistoj povas edukigi; kaj poste ankaŭ ili povas instrui esperanton.

Oni nun instruas esperanton en la mezlernejoj kaj amase en la elementaj lernejoj. Tio estas la plej kutima maniero lerni esperanton. Alia ebleco ekzistas en la kulturdomoj, kie oni pov-



vas lerni en libervolaj kursoj, sed tio ne estas tiel amasa. Mi memoras, ke post la rusa, angla kaj germana lingvoj en la lernejo sekvas esperanto, antaŭ la itala kaj hispana lingvoj.

—Laŭ viaj vortoj ŝajnas, ke instruado de esperanto vere estas grandskala. Ĉu tio estas ia sekvo de la eksperimenta instruado aŭ ĉu tio estis jam pli frua?

—Tio estis jam pli frua.

—Sed ĉu la eksperimentoj iel helpis al la plivastiĝo?

—Laŭ mi ili helpas. La kultura komitato de la parlamento baldaŭ traktos tiun punkton. La rezultoj de la eksperimentoj donis al ni la eblecon starigi la demandon antaŭ la parlamenta komitato pri kulturo.

—Ĉu oni povas antaŭvidi iujn elpaŝojn internacie? Mi ne pensas unuavice pri agado en internaciaj organizaĵoj, sed pri iaspeca interparlamentara kunlaboro kun formiĝantaj grupoj en aliaj parlamentoj. Mi pensas pri la brita kaj la itala grupoj, kaj pri aliaj, kiuj ankoraŭ formiĝas. Ĉu vi kredas, ke la hungaraj parlamentanoj povos ion entrepreni tiurilate?

—Jam funkcias tutmonda organizo, en kiu ĉiuj parlamen-

tanoj partoprenas, la interparlamentara unio. Ni ne faru novan organizaĵon. Laŭ mi esperanto estas tia demando, ke ni devus atingi ke la interparlamentara unio okupiĝu pri ĝi. La interparlamentara unio uzas kelkajn lingvojn por sia laboro. La celoj de la esperantomovado pri interkompreniĝo, batalo por la paco ktp estas la samaj kiel la celoj de la interparlamentara unio. Ni devas trovi vojon kunlabori. Estus erare fondi novan organizaĵon.

—Mi ankaŭ ne celis novan organizaĵon, sed kontakton inter la grupoj de parlamentanoj, kiuj subtenas esperanton, ekzemple por komune entrepreni ion ĉe la interparlamentara unio. Ĉu oni povus atendi ion tian kiel pluan paŝon?

—Mi pensas, ke tio estus ebla, sed ĝuste en la jam ekzistantaj kadroj. Eble hungaraj kaj svedaj parlamentanoj povus fari ion kune. Kion vi kredas?

—Bedaŭrinde ne ekzistas tia grupo en la sveda parlamento. Ekzistas kelkaj simpatiantoj, kun kiuj ni havas iom da kontakto, sed ne organizita grupo. Povas esti, ke ni sukcesos organizi ion. Se tio eblas, povus esti ke tia grupo, kune kun du tri aliaj, povus fari iajn proponojn. La interparlamentara unio eble estas pli facila forumo, ĉar ĝi ne estas tiel oficiala kiel UN. Sed agado tie ne kondukis al konkretaj rezultoj. La interparlamentara unio, laŭ mi, estas ĉefe diskutforumo. Ĝi ne decidas pri io.

Sed ni revenu al la hungaraj lernejoj, en kiuj oni instruas esperanton. Kiu decidas pri tiu instruado?

—La direktoro de la lernejo mem decidas. Se ekzistas sufiĉe multe da lernantoj, kiuj volas lerni esperanton, la direktoro povas aranĝi tion, kaj en la elementa kaj en la meza lernejoj.

—Vi ŝajne ne havas problemon pri instruistoj — aŭ ĉu ili mankas?

—Pedagogoj ĉiam mankas. Kvankam multaj lernas esperanton, ne ĉiuj instruas ĝin. Pedagogoj havas ankaŭ multajn aliajn kulturajn taskojn kaj eble ne restas al ili tempo ankaŭ por esperanto.

—Ĉu estas bezonata formala kompetenteco por rajti instrui?

—Jes, tiel nomata C-diplomo, kiun donas la pedagogia komitato de HEA. Oni povas ekzameniĝi ĉe la universitato, ĉe kelkaj altlernejoj, sed ankaŭ ĉe kelkaj kulturdomoj kaj kluboj.

Ni estas sufiĉe kontentaj en Hungario, ĉar nun pli ol 4000 aŭ 5000 esperantistoj laboras. Mi scias, ke pli ol 20 000 lernas esperanton en la lernejo kaj havas t n klasan ekzamenon. Sed ni ne estas tute kontentaj, ĉar la rezulto povus esti ankoraŭ pli bona.

—Ŝajnas esti malfacile akiri la novekzamenitojn kiel membroj de la esperantoorganizo. Tio ŝajnas esti la sama en ĉiuj landoj.

—Jes. La movado devus pli bone labori. La gelnantoj ekzistas, sed la movado ne scias bone ligi ilin

—Eble mankas konkreta plano, kion ili faru kun sia esperantokono. Esperanto estas unu el iliaj multaj interesoj, kaj kiam ili devas elekti, esperanto facile forfalas. Oni devas trovi agadojn per kiuj ligi ilin, daŭre teni ilian intereson, tiel ke ili ne malaperas.

—Jes, sed ankaŭ eldonado de revuoj kaj libroj por tiu aĝgrupo mankas. En hungario aperas tia revuo, *Juna amiko*, kaj la infanoj ŝatas ĝin, sed libroj mankas.

—Vi tute pravas. Oni devus dediĉi pli grandan intereson al tio.

—Alia demando estas, ĉu oni povas havi utilon de esperanto por sia laboro; ĉu oni povas, ekzemple, lerni ion novan pri tekniko per esperanto. Kiel estas nun, esperanto ne donas tiun eblecon. Ankaŭ tiun ĉi kampojn ni multe neglektas. Ni devas ĉesi pensi pri esperanto kiel lingvo por amuzado.

—Certe. Tio estas ankaŭ la kaŭzo, kial multaj forlasas esperanton kaj ne venas al la organizaĵo. Ili tute ne havas utilon de esperanto por siaj studoj.

—Tio estas serioza problemo. Ni en Hungario pripensas eldonon de nova revuo, kiu temu pri tekniko kaj scienco, aŭ eventuale pri dono de nova enhavo al la hungaraj esperantorevuoj, kiuj enhavu multe da teknikaj artikoloj. Nun plejparto temas pri kulturo kaj literaturo. Kaj tio ne tiel multe helpas al la esperantomovado.

Tiuj, kiuj serioze okupiĝas pri folkloraj kantoj skribu al:
Goar Engeländer
Thomasweg 3
D-4796 Salzkotten
FRGermanio

Frankeras ej
Esperantoförbundet
betalar portot

Esperanto

SVARSFÖRSÄNDELSE
Kontonummer 2108
122 04 ENSKEDE

Vi håller att planera nästa års kongressresa till Luzern. Vill du hjälpa oss att göra den så bra som möjligt? Fyll i detta frågeformulär och skicka det till Esperantoförbundet före slutet av oktober. Kortet är portofritt.

FRÅGEFORMULÄR

(OBS! Inte anmälningssblankett!)

Hur vill du åka till Luzern?

flyg tåg bil

Hur länge vill du stanna i Luzern?

1 vecka 10 dagar 2 veckor

Behöver du hjälp med hotell?

Ja Nej

Om SEF anordnar en extra semestervecka efter kongressen (t ex på annan plats i Schweiz), följer du med?

Ja Nej

Om du behöver anmälningssblanketter, sätt ut ditt namn och adress.

Skicka mig anmälningssblankett(er) till kongressen i Luzern

Namn:

Adress:

.....

Medföljer som tidningsbilaga